VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinár. jazyka.
Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mn. Hradiště č.1161
Cena – dobrovolný příspěvek
Povolil ONV Mladá Boleslav, odb. kultury 47/87-403/16

Numero 4 1991 Říjen Číslo 4

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Radikala partio – intencas oficiale proponi al ĉirkaŭ 40000 parlamentanoj en la mondo, al la organizaĵoj de Eŭropa komunumo kaj de UNO, al la naciaj parlamentanoj ĝis la fino de 1991 projekton pri adopto de Esperanto kiel helplingvo por internaciaj kontaktoj. La partio havas centron en Romo. Ĝi estas pacisma, propagandas ideojn de Gandhi kaj Martin Luther King, mondfederismon, neperfortan revolucion demokratian. En la alvoko al esperantistoj ĝi asertas, ke Eo estas mortkondamnita, se ĝi ne estos oficiale uzata por internaciaj kontaktoj. Ĝi instigas ĉiun esperantiston aliĝi kaj pagi la membrokotizon, kiu bedaŭrinde ne estas malgranda: 1 Kčs elpoŝigi por la partio ĉiutage = 365 Kčs jare. Tamen ni komprenas, ke efektivigo de tiaj celoj postulas multekostan fortan propagandon. Supernacia Radikala partio dissendis riĉan verban materialon al ĉiaj registritaj esperantistoj. Kontaktoj: Radikala Partio, Krakovská 9, 11000 Praha 1.

Radikální strana – chce do konce roku 1991 navrhnout asi 40000 členům parlamentů ve světě, organizacím Evropského společenství a OSN, národním členům parlamentů, projekt přijetí Esperanta jako pomocného jazyka mezinárodních styků. Strana má centrálu v Římě. Je stranou pacifistickou, propaguje ideje Gandhi-ho a Martina Luthera Kinga, světový federalismus, nenásilnou demokratickou revoluci. Ve výzvě k esperantistům ujišťuje, že Eo je k smrti odsouzeno, jestliže nebude oficiálně užíváno k mezinárodním stykům. Vybízí všechny esperantisty k začlenění a k placení členského poplatku, který bohužel není malý: platit na stranu 1 Kčs denně = 365 Kčs ročně. Chápeme však, že uskutečnění takových cílů vyžaduje mohutnou propagandu, cenově náročnou. Transnacionální radikální strana rozeslala bohatý náborový materiál všem registrovaným esperantistům. Kontaktní adresa, Krakovská 9, 11000 Praha 1.

Faktoj – argumentoj. Ofte ni estas en situacio, kiam mankas faktoj por argumentado dum diskutoj kaj pledoj pri esperantismo. Jen kelkaj faktoj el la letero, kiun sendis nia konata samideano K.P. en sia letero al nia prezidanto Havel, kiam li malakceptis la rolon de la alprotektanto dum planata UKo 92 en Prago, jubilea jaro de Komenius. „Mian atenton kaptis via esejo „Politiko kaj konscienco“, kie vi skribas: „Antaŭ ni staras baza tasko: fronti vigle atente, pripense, tamen kun plena propra aktiveco, kontraŭ … iracia memmovo de anonima nepersona kaj nehoma potenco de ideologoj, aparatoj, burokateco, artefaritaj lingvoj kaj politikaj sloganoj …“ Post kelkaj vortoj vi rekomendas „kredi voĉon de sia konscienco … ne honti pro ti, ke ni estas kapablaj de amo, amikeco, solidareco, kompato kaj toleremo … kiuj estas sola prava elirejo al sencoplena homa kunvivado …“ - Jen, mi ne scias kion vi pensas per vortoj „artefaritaj lingvoj. Mi opinias, ke vi pensas per tio jenan totalecan „antilingvon“, kiu agreson dece nomis „frata helpo“, nigran nomis blanka, blankan nigra. Tamen sub tiun nocio oni ne povas envicigi Esperanton. Neniam ĝi havis ion komunan kun superpotenco, totaleco aŭ subpremo. Ĝuste renverse tuj dekomence ĝi ĉiam staris sur la hela flanko de barikado, sur tiu flanko, sur kiu vi ĉiam staris. Ĝi estis la lingvo de amo, amikeco, solidareco, kompato kaj toleremo. Cetere ĉi tiun sigilon fiksis al ĝi eĉ ĝia kreinto L.L.Zamenhof, ku sumon da tiaj ecoj deklaris kiel „Interna ideo“. Li ĝin neniam difinis kaj ĝi fariĝis poste „spirito“ de Eo. Kaj estis ĝuste tiu alte humaneca kaj iom mistera ŝarĝo, kiu ebligis al Eo travivi ĉiujn krizojn de ĝis pli centjara ekzisto (1887). Tamen ĝuste pro sia alvoko por konscienco kaj sencohava homa solidareco, devis Eo multe pagi: ĝi estis persekutita en cara Ruslando, sufokis ĝin Hitler same kiel Stalin kaj pluaj uzurpatoroj de komunismo kaj faŝismo. Por ĉiuj totalismaj reĝimoj Eo estis „La danĝera lingvo“ (titolo de 568 paĝa libro pri subpremo de Eo de Ulrich Lins).

Fakta – argumenty. Často jsme v situaci, kdy během diskusí o Esperantu chybí fakta pro argumentaci. Následuje několik fakt z dopisu, který poslal náš známý s-ano K.P. ve svém dopise našemu prezidentovi Havlovi, když odmítl úlohu svou osobou zaštítit plánovaný Kongres 92 v Praze, v jubilejním roce Komenského. „… Moji pozornost upoutala Vaše esej „Politika a svědomí“, kde píšete: „Před námi je základní úkol: Bděle, rozmyslně, ale zároveň plným sebenabízením čelit … iracionálnímu samopohybu anonymní, neosobní a nelidské moci ideologů, aparátů, byrokracií, umělých jazyků a politických hesel …“ A o kus dále pak doporučujete „ ..věřit hlasu svého svědomí… nestydět se za to, že jsme schopni lásky, přátelství, solidarity, soucitu a tolerance .. což jsou .. jediná pravá východiska k smysluplné lidské pospolitosti.“ Nuže nevím, co přesně rozumíte slovy „umělé jazyky. Domnívám se, že tím míníte onen totalitní „antijazyk“, který agresi cudně nazýval „bratrskou pomocí“, černé vydával za bílé a bílé za černé. Ale pak pod tento pojem nelze zařadit Esperanto. Nikdy nemělo nic společného s žádnou mocí, totalitou či útlakem. Právě naopak hned od počátku stálo vždy na světlé straně barikády, na té straně, na které jste vždy stál vy. Bylo jazykem lásky, přátelství, solidarity, soucitu a tolerance. Tuto pečeť mu vtiskl ostatně i jeho tvůrce L.L.Zamenhof, který souhrn těchto vlastností označil jako „Vnitřní idea“. Nikdy ji nedefinoval a stala se pak „duší“ Esperanta. A byla to právě tato vysoce humanitní a trochu mystická náplň, která umožnila Eu všechna úskalí jeho více než stoleté existence (1887). Avšak právě pro svůj apel ke svědomí a smysluplné lidské pospolitosti, muselo Eo draze platit: bylo pronásledováno v carském Rusku, rdousil je Hitler stejně jako Stalin a další uzurpátoři komunismu a fašismu. Pro všechny totalitní režimy Eo bylo „Nebezpečný jazyk“ (titul 568stránkové knihy o útlaku Ea z pera Ulricha Linse.)

Tial logike Eo fariĝis ideala lingvo de disidentoj, kiujn kvazaŭ ĝi altirus. La unuaj esperantaj disidentoj estis jam rusoj. Ili finis siajn vivojn en ekzekutejoj kaj koncentrejoj en Siberio. E-aj renkontiĝoj ofte estis malebligitaj … La reĝimo tre bone sciis, ke Eo ne estas ludilo de literaturistoj, sed antaŭ ĉio „ideala helpo elirejo“ por verkistoj, kiuj en propra lando ne povas skribi vere. Eo estas lingvo de libereco. Kaj ne nur tio. Iam estis pordo por la lingvoj la latina. Eo estas pordo por la latina kaj pluaj mondlingvoj. Ĝi estas propedeŭtiko kaj enkonduko al plej internaj mekanismoj de la lingvo entute. Ĝi estas interkomprenilo de homo al homo, ĝi estas lingvo de amikeco, amo, solidareco, kompato. Kaj ĝi estas facila kaj nekomplika kiel la amo mem. Ĝi estas la lingvo po ĉiuj, kaj de edukitaj, kaj precipe de tute ordinaraj kaj simplaj homoj kaj hometoj, al kiuj por ellerno de komplikaj nacilingvoj kutime mankas tempo, okazo, eventuale talento. Tamen eĉ tiaj homoj volas interkompreniĝi kaj havi amikojn eksterlande … Eo jam ekdelonge ne plu estas artefarita lingvo. „Artefarita“ ĝi estis eble en la jaro 1887 en siaj komencoj. Post 103 jaroj da natura evoluo kaj intensiva uzado ĝi estas viva lingvo, same kiel ĉiu alia viva lingvo. Nur ĝia evoluo, diference de aliaj lingvoj, estas detale dokumentita. En tio bazas ĝia plua valoro por lingvoscienco, respektive interlingvoscienco. Kaj tial en la jarcento de la angla ĝi ne perdiĝos. Ĝi restas la lingvo de homoj, de interhomaj rilatoj, lingvo de la patrujo, varmo de la hejma kameno, odoro de patruja terbulo, mesaĝo de homo al homo. Kaj per tio vole aŭ nevole ĝi fariĝas elektita instrumento de la literaturo kaj poezio, eĥo de beateco antaŭ konfuzo de lingvoj apud babilona turo, rememoro pri paradizo! Tamen por ni ĉiuj, same kiel por ceteraj mezeŭropanoj, havas Eo ankoraŭ unu dimezion. Pere de ĝi hodiaŭ ni kvazaŭ ripete travivas ĉarmon de nia nacia renezanco, tiun fantazian fakton, ke ĝuste antaŭ niaj okuloj naskiĝas io tute nova kaj tamen kvazaŭ konata: lingvo, literaturo, komunumo de homoj de la bona volo, kiuj komprenas unu la alian, komenco de nova homarismo.

Tak se stalo Esperanto logicky ideálním jazykem disidentů, které jakoby přitahovalo. Prvními disidenty byli rusové. Končili své životy na popravištích a v koncentrácích na Sibiři… Esperantská setkání často byla znemožněna… Režim dobře věděl, že Esperanto není hříčkou literátů, ale především „ideálním východiskem“ pro spisovatele, kteří ve vlastní zemi nemohou psát pravdu. Esperanto je jazykem svobody. A nejen to. Kdysi branou k jazykům byla latina. Esperanto je branou k latině a dalším světovým jazykům. Je propedeutikou a úvodem do nejniternějších mechanismů jazyka vůbec. Je dorozumívacím prostředkem člověka k člověku, je jazykem přátelství, lásky, solidarity, soucitu. A je jednoduché a nekomplikované jako láska sama. Je jazykem pro všechny, jak pro učené, tak zejména i docela obyčejných prostých lidí a lidiček, kterým pro zvládnutí složitých národních řečí obvykle chybí čas, příležitost, případně nadání. Jenže i tito lidé se chtějí dorozumívat a mít přátele v cizině… Eo už dávno není umělou řečí. „Umělé“ snad bylo v roce 1887 ve svých začátcích. Po 103 letech přirozeného vývoje a intensivního užívání je jazykem živým jako každý jiný jazyk. Jen jeho vývoj, na rozdíl od jiných jazyků, je přesně zmapován. A v tom je jeho další přínos pro lingvistiku, respektive interlingvistiku. A proto ve století angličtiny se neztratí. Zůstává jazykem lidí, jazykem mezilidských vztahů, řečí domova, teplem domácího krbu, vůní rodné hroudy, poselstvím člověka člověku. A tím, chtě nechtě, stává se vyvoleným nástrojem literatury a poesie, ozvěnou blaha před zmatením jazyků u babylonské věže, vzpomínkou na ráj! Avšak pro nás všechny, stejně jako pro ostatní středoevropany, má Eo ještě jeden rozměr. S ním dnes jakoby znovu prožíváme kouzlo našeho národního obrození, ten fantastický fakt, že přímo před našima očima rodí se něco zcela nového a přece jakoby známého: jazyk, písemnictví, společenství lidí dobré vůle, kteří si navzájem rozumějí, počátek nového lidství.

AFRIKA POPOLRAKONTO LA TRI AMINDUVANTOJ (Speciale por Verda Familio tradukis akademiano Bernard Golden, Hungario). Iam estis (byli jednou) tri viroj, tri bonaj amikoj, Tame, Dombou kaj Kambeu. Tame estis el Dimba: li estis tesugo (ano de afrika tribo – Kasi-Bonso; li estis togo (-"-). Ili devenis (pocházeli) el tri urboj, sed ili estis bonaj amikoj. Ili amindumis la saman junulinon (zamilovali se do stejné dívky), Jele. Ili ne sciis unu pri la aliaj. Ili ne sciis, ke ĉiuj tri volonte edziĝus al la junulino. Jele estis bela; ŝi estis diligenta; ŝi estis riĉa (bohatá). Tame, ĉiun benitan (požehnaný) tagon, kiam li iris al Jele iomete konversacii, portis kiel donacon korbon da fruktoj de la boabarbo. Dombou, ĉiun benitan tagon, kiam li iris al Jele iom konversacii, portis kiel donacon korbon da arakidoj (burské oříšky). Kambeu, ĉiun benitan tagon, kiam li iris al Jele iomete konversacii, portis kiel donacon korbon da kabrioj (frukto de afrika konifera arbo). Tiel ili amindumis ŝin, tiel ili portis la donacojn, ne por mallonga tempo. Iun belan tagon la patrino de Jele diris al ŝia filino: „Tri bravaj (hodní) viroj venas tien ĉi ĉiun benitan tagon. Ili portas valorajn donacojn. Ĉiuj tri volonte edziĝus al vi. Elektu (vyber) inter ili. Ĉiuj tri estas bravaj viroj, honestaj (čestní) viroj, se miaj okuloj ne trompas (neklamou) min. „Mi ne povas elekti inter ili. Elektu por mi," diris Jele. „Tiel decas (sluší se), ke vi elektu. Mi ne deziras, ke vi povu diri al mi, se mi hazarde farus malbonan elekton, ke mi elektis malbonan edzon por vi," diris la patrino de Jele. „Sed mi tute ne povas elekti. Elektu por mi," diris Jele. Do la patrino de Jele iris al maljunulino kaj demandis ŝin: „Ĉu vi povas saĝe konsili al mi pri mia malfacilaĵo? Mia malfacilaĵo estas, ke tri bravaj viroj venas al mia filino. Ĉiuj tri volonte edziĝus al ŝi; ĉiuj tri portas valorajn donacojn ĉiun benitan tagon. Ni ne povas elekti inter ili. Ĉu vi povas saĝe konsili al mi pri mia malfacilaĵo?" „Estas simpla afero. Kaŝu (ukryj) vian filinon hejme kaj alvoku ĉiujn tri virojn. Diru al ili, ke via filino mortis. Diru, ke vi deziras redoni iliajn donacojn. Tuj vi scios, kian sintenon (chování) ili havas," respondis la maljunulino. „Saĝa konsilo. Mi akceptos ĝin," diris la patrino de Jele. Ŝi iris hejmen, kaŝis sian filinon kaj sendis mesaĝiston (posla) al Tame la tesugo, al Dombou la gindo, al Kambeu la togo. Ŝi mesaĝis al ili: „Venu al mia domo. Mia filino Jele mortis. Mi volas redoni al vi la multajn donacojn, kiujn vi portis." Ĉiuj tri iris al la patrino de Jele. Tame la tesugo klinis (sklonil) kaj diris: „Tio ne koncernas (týká se) min. Redonu miajn donacojn. Jele mortis, kaj mi akiri (získat) por mi kvindek junulinoj per tiuj ĉi multaj donacoj." Foriris Tame la tesugo. Dombou la gindo klinis la kapon kaj diris: „Tio ne koncernas min. Redonu miajn donacojn. Jele mortis. Mi povus akiri por mi kvindek junulinojn per tiuj ĉi multaj donacoj." Foriris Dombou la gindo. Kameu la togo klinis la kapon. La patrino de Jele demandis lin: „Do kiel estus por vi?" „kion mi faru per la multaj kaŭrioj? Estis nur unu Jele. Vane mi akirus kiom ajn da junulinoj por mi. Neniel mi povas ricevi Jele." Foriris Kambaŭ la togo. Kvar monatoj forpasis (uplynuly). Post kvar monatoj la patrino de Jele denove alvokis la tri bonajn amikojn. Ŝi diris al ili: „Jele ne mortis. Ŝi vivas." Ŝi montris la junulinon al ili. Tiam ŝi diris al Tame la tenugo, al Dombou la gindo. „Vi ne amis mian filinon, sed viajn trezorojn (poklady). Tion vi volis akiri por vi mem." Al la togo Kambeu ŝi diris: „Vi pli estimis mian filinon ol la multajn kaŭriojn. Mia filino estas via." Tiel Kambeu la togo ricevis la belan Jele kiel edzinon.

VÍTEK JOSEF, la unua prezidanto de nia Ĉeĥa Esperanto Asocio, estis en niaj koroj rememorata la 29an de majo okaze lia okdekjara naskiĝtago, kiun li bedaŭrinde ne povis ĝisvivi. Ni rememoru lin per miks-poemo, kiun donacis al li okaze de lia sepdekjariĝo Eva Seemanová:

Milý příteli a kamaráde!
Vane mi klopodis ade
pro ten slavný dnešní den -
kiun festu sen ĉagren´ -
vymyslet si vzletná slova.
Mi ne estas tion pova,
já to prostě neumím,
mankas al mi vers´ kaj rim´.
A tak aspoň dobrá vůle
nun montriĝu senskrupule,
a že Vás mám hodně ráda
rakonteto jen balada:
Jednou v krásném jarním čase -
kiel temp´ rapidas pase -
děťátko se narodilo
al gepatroj eta filo.
A jak si tak pěkně hajá
en printempa nokto maja,
lehký stín se položil,
en noktmeza luna bril´
chlapečkovi na líčka:
venis al li sudička.
K děťátku se naklonila
kaj per flustro ventfacila
do té jarní noci vonné
sonis kanto violona:
Do vínku Ti dávám lásku
dum la viv´ ĝi ne fiasku !
Se všech stran Ti zářit bude -
oriente, norde, sude -
barva jedné hvězdy čisté,
kiun sekvos Vi persiste.
Pro krásnější, lepší svět,
por pli justa societ´,
pro život jenž v míru kvete
vi batalos senkviete.
Nezradíš ten hvězdy svit,
vi ĝin sekvos sen profit´.
Pak zmizela dobrá víla,
kiel nur lunbril´ subtila…
Ale její drahé věno
portis Vi dum vivopeno.
Neúnavně, kun fidelo
servis vi al verda stelo.
Nenarostlo tolik květů
kion mi kun amo metu
do náruče pionýru -
do almenaŭ nun mi diru:
Spokojenost, štěstí, zdraví
mi deziras kore al Vi,
ještě mnoho šťastných chvil
vivu Vi en verda bril´
a kéž žádné přání Vaše
dezirata eĉ nur kaŝe -
nezůstane přáním jen.
Multajn jarojn sen ĉagren´
ať Vám osud ještě chystá,
kaj la stelo pacifista
ať Vám září v celé kráse !
Daŭre gvidu vin kompase
co Vám bylo sudbou dáno:
la verdstela talismano !

S-anino WAGENKNECHTOVÁ Helena forpasis en juna aĝo de 38 jaroj en Zruč nad Sázavou. Ŝi estis profesia tradukantino de angla kaj esperantiĝis en la jaro 1981. Tutan vivon ligita al ĉareto tamen ŝi propagandis Eon al siaj lernantoj. Dankon por ĉio!
BEŇUŠOVÁ Drahomíra, 1973, K. Hora, Revoluční 597 sukcese finstudis la bazan korespondan kurson de Eo. Ŝi akceptu nian koran gratulon!
MULTAJN ADRESOJN por e-a korespondado vi trovos en World Frieras-adresaro. Sendas Jiří R. Zvěřina, 6.května 26, 46001 Liberec.
MALLONGE el la esperantista mondo: DAR estas tagĵurnalo el Ostrava kiu ofte alportas informojn pri esperanto, ekzemple intervjuon kun s-ano Vlado Sládeček, interparolon pri opinioj de la gastoj eksterlandaj dum renkontiĝo en ĉijara turisma E.semajno en slovaka paradizo, raporton pri la somera tendaro en Lanĉov ktp. Sendu dankleterojn al DAR, 70950 Ostrava, Mariánské nám.5, por konvinki ke la esperanta publiko ekzistas kaj scias pri tiu aktiveco. - RADIO AŬSTRIA INTERNACIA VIENO (Vídeň) A-1136 Wien – elsendas esperante dimanĉe dufoje tage laŭ vintra tempo je 5,05 kaj 14,05 m kurtonde. Se vi ne bone aŭdos la programerojn, skribu afable al la adreso de Radio Vieno, kiu sendos al vi skribe la plenan tekston. Se vi sendos post unusemajna paŭzo du petojn ekzemple en formo de poŝtkartoj ili sendos al vi senpage Beckman: „Historio de Esperanto“, aŭ „Superrigardo pri Aŭstrio, rememoron pri Franc Jonas prezidanto kaj samideano, k.t.p. - INTERHELPO p.s.44, 15000 Praha 5, kooperativa vojaĝagentejo organizas ekskursojn, eldonas e.librojn. Petu proponon. - Post antaŭiranta traktado inter prof. Dro Novobilský kaj Universitato de Karlo en Prago estis solene malfermita la 29an de aŭgusto filialo de Akademio Internacia Sciencista San Marino en Prago, unua esperanta lektorejo en niaj universitatoj. - E.klubo en Karlovy Vary kaj klubo en Schwarzenberg,D, organizis ĉeliman renkontiĝon, jam la 14an ĉeliman fratan renkontiĝon. Petu frue informojn pri la plua renkontiĝo (en Germanio). - Universala kongreso (monda) okazos en Vieno 25.VII-1.VIII.92. Origine ĝi estis planita al Prago en kadro de la solenaĵjaro de Comenius. La klubo en Třebíč proponas vian partoprenon en tiu pinta okazaĵo de la esperanta vivo, kaj ebligos ĝin al vi per restado dum tiuj tagoj en Lanĉov apud Vranové en nia tendaro per ĉiutagaj ekskursoj al Vieno (1 kaj duonhora aŭtobusa veturado) en prezo de 2300 Kčs, kiu inkluzivas aŭtobuson, tranoktadon kaj manĝon. Aparte oni devas pagi ankoraŭ la kotizon por UEA-kongreso inter 68 kaj 158 guldenoj (1 gld=17 Kčs). KOMENSKÝ kaj INTERLINGVISTIKO, estos la nomo de filatelia ekspozicio tiunoma kadre de la Universala Kongreso en Vieno. La ekspozicio okazos en Strážnice. Petu informojn ĉe Vlado Hasala, kp.k.34 69662 Strážnice. TEC (terminologia Esperanto Centro) vigle laboras. Informojn kaj cirkulerojn dissendas ĝia estro Ing Jan Pospíšil, Leningradská 3112, 27204 Kladno. - La Internacia Esperanta Fervojista monda konferenco okazis en Olomouc 11.-17.V.91 sukcesis. Partoprenis en ĝi 400 esperantistoj. Precipe filatelistoj ĝojis pri eldono de solenaj stampoj, kiujn povas sendi al vi Vláďa Hasala, adreson vidu supre. - ESPERANTAJ MONUMENTOJ – kolekton při tiaj fotogravaĵoj kontraŭ 6 Kčs sendas Drahomír Kočvara, 70400, Ostrava-Zábřeh, Hulvácká 18. - Liston da haveblaj libroj el nia asocio kaj hungara EA sendos Dr Pavla Jodasová, ĈEA, Jílská 10, 11000 Praha 1, same kiel E-adresaron de e-organizaĵoj, landaj asocioj, junularaj organizoj en la mondo. - Informleterojn pri agado de la klubo sendos al vi Peter Bartal, J.Mudrocha 1356/23, 90501 Senica. -

KIEL DIRI? LENTAIGNE. Praktika esperanta frazeologio: Temo: Karaktero – Kolero – Ŝerco. Karaktero (naturo, humoro) gaja, feliĉa, firma, milda, olea, nobla, arda, rezoluta, solida, ŝercema, fortika, hardita, iniciatema, elita, egala, kompleksa, melankolia, kolera, kaprica, hezitema, cedema, ŝanĝhumora, kurbiĝema (křivák), ŝanceliĝema, impulsiĝema, enfermiĝema, eksplodema (kiel polvo), flamiĝema (kiel ligno rezina – smolnice), obstina (kiel azeno, mulo), ekscitebla kiel bolanta akvo. Mi konas vin bone, ol vi mem konas vin. Ne havi emon ŝerci. Esti en ŝercema humoro. Ekvilibro de humoro. Ŝi estas anĝelo de mildeco. Forteco de karaktero. Malbonaj trajtoj de karaktero. Karaktero havanta grandajn difektojn. Karaktero laŭ la vetero. Esti ellitiĝinta per la malbona piedo. Fari „dikan lipon“ (= paŭti, ohrnovat rty). Infana kaprico. Li ĉiam bojas, grumblas kontraŭ ĉio. Lia karaktero estas por mi enigmo (hádanka). Tio kuŝas en lia karaktero, en lia humoro. Afineco (altiriĝemo inter du samkarakteraj homoj). Diverseco de karakteroj. Profunda dissonanco inter la karakteroj. En komparo kun sia filino, ŝi estas milda. Mi estas tre impresiĝema. Ŝi apartenis al tiu kategorio de karakteroj, kiu… - Kolero: flama, ekscesa, neretenebla, senbrida, elĉenigita, retenata, obtuza (temný), justa. Perdi al iu paciencon. Tiri sur iun ies koleron. Verŝi oleon sur fajron. Iriti. En granda kolero. Ŝajnigi koleron. Ili kun ŝajna kolero stakis unu la alian. Vidi sur iu, ke li estas kolera. Atako de kolero. Lia buŝo ŝaŭmas de kolero. Koleri kontraŭ iu. Kolerigi iun. Ekscitiĝi ĉe la plej malgranda bagatelaĵo, kiel bolanta akvo. Ne havi kaŭzon por koleri. Li ne povas rezisti al sia unua impulso. Ne plu povi sin regi. Elverŝi sur iun sian koleron. Furioziĝi. Montri, aperigi koleron. Fari geston de kolero. Boli de kolero. Bati la tablon per pugno (pěstí). Eksplodi de kolero. Ruĝiĝi per kolero. Pala pro kolero. Esti ekster si. Perdi la estrecon de ŝi mem. Esti kolera kiel rabia hundo. Esti furioza, en plena ekscitiĝo. En tia stato esti kapabla je ĉio. Kvietiĝis lia kolero. Disciplinigi siajn impulsojn. Bridi, sufoki sian koleron. Regi super sia kolero. En ĉiu okazo, li scias ekregi sin. Milda respondo kvietigas koleron. - ŜERCO peza, triviala, maldelikata, malkonvena, pikanta, ofenda, senkulpa, sensala, sengusta, sensprita. Ne havi emon ŝerci. Esti en ŝercema humoro. Tio ne estas ŝerco. La ŝerco maltrafis, retrotrafis. Sufiĉe da ŝerco. Li ne komprenas ŝercon. Distriĝi per ies ŝercoj. Fari ŝercojn. Ŝerce dirite. Spriti. Longaj konversacioj spicitaj de bonhumoro kaj ŝercoj.

KORESPONDI DEZIRAS: (Mallongiloj-zkratky) bk=bildkartoj; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ= interŝanĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi;m=muziko; pm=poŝtmarkoj; tm=tutmonde
Yemi Awotunde, A jara Grammar School, P.O.Box 19, Badagry, Lagos state, Niĝerio, 30jj instruisto, komencanto d kor. Kroma peto: La E-grupo de Bagary, ĉe Serafin Anagovi (sama adreso) tre d ĝemeligi kun Esp.grupo tm.
SALUTON! Kun vi estas Anuŝka, 25j, 155/48, nigrahara, buntaj okuloj. D seriozan konatiĝon kun viro 25-35 j edziĝcele. Dankon! Anuŝka Petrova, ul. Otec Paisij 9, BG-8000 Burgas, Bulgarujo.
Jordan Talev, str.Konstantin Šejtanov 11, ap.17, BG-4004 Plovdiv, Bulg. 38Jj, konstruinĝeniero, d kor tm ĉt.

Zhou Zhenghui, Ningde Teacher College, English Dep, Ningde-Fujian, Ĉinio 26jj instruisto serĉas leteramikojn.
S-ro Konstantin Georgiev, Zahari Zograf 28, BG-2000 Samokov, Bulg., 35j dentisto d kor ĉt tm
Ming Jin, Shasi-Zhengxie, Jiang Jing Lu 17, Shasi Hubei, Ĉinio, d kor pri kunlaboro en komerco.
Nishikowa Naoyoshi, Mie-ken, Ichishi-gun, Ureshinocho, NAKAGAWA 696-9 A-101, 515-23, Japanio, japana municipa oficisto d kor tm pri kulturo, historio, ekonomio, ĉiutaga vivo.
Anoj de E-klubo „Pli da lumo“ d kor tm, komencantoj. Gustavo Morales, Gaveta Postal 2, Stgo de las Vegas 17200, C.Habana, Kubo.
Jean Codjo, B.P.04, Lokossa (mono), 24j, BENIN, AFRIKO, tm ĉt
Abraham Mrakpor U.S., Departement of Civil Enigineering, Ugbowo Campus, University of Bebib, Bendel Stato - pri religio, literaturo, muziko, 24j
Ekaterina Petrova, ul.Ĥr.Botev 1 vh A ap.9, v Mineralni Bani 6343, Ĥaŝkovska obl., 43 j, tm ĉt. Bulgario
Ĥritina Atanasova, ul.„Kapitan Petko Vojvoda“ 18, v.Garvanovo, Ĥaŝkovska obl., 16j tm ĉt, Bulgario
Vladimir Dunev, v.Malomir, BG 8650 Burgaska obl. tm sporto, m, fotado.
Andrzej Szwanke, ul.Orzechowa 50/13 PL 50-540 Wroxlaw, 31j soldato tm pri lingvistiko, kol monerojn.
Jerzy Szczepanski, PL 34-120 Andrychow, ul. Lenartowicza 14/67 tm 27j, masaĝisto, pri medcino, orienta filozofio, ekologio, sporto.
Jayrousi k.Eliakimu, 23j, fraŭlo, Kirumba Pentekoste Church, Box 83, Mwanza, Tanzanio, Afriko tm ĉt.
Aron Anthony Rupepo, (30j, komercisto), St.Stephano Church, P.O.Box 144, Shinvanga, TANZANIO, Afriko, ĉt, tm.
Larisa Bogomazova, SU 656060 Barnaul 60, ul.Jurina 246-60, 18j, studentino, tm pri lingvoj, vojaĝado
Adresojn de firmaoj uzantaj Esperanton, kolektas grupo FUTUR, Ilija Andreev, P.K.120, Bg 9700 Ŝumen
Aperis rok-muzika esperanta gazeto ROK-GAZET, C/o Eurokka, Esperanto Rok-Asocio, F-31450 Donneville, Francio.

xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
CS 29501 Mnichovo Hradiště